# KOMUNIKOJ DE LA DIREKCIO

*Sub tiu titolo ni respondos la demandojn, kiuj ne necesigas leteron. Kiu deziros privatan respondon, tiu bonvolu skribi per poŝtkarto kun parto por respondo pagata.*

➤ S-o A. Barbot estas nur presisto kaj ne libristo. Tial oni sin turnu al li *nur* por l'abonoj. Ĉiuj ceteraj leteroj aŭ mendoj devas esti adresataj *rekte* al la Direktoro de E. K.

➤ **Ni petas la Direktoroj de Esperantaj gazetoj, ke ili ŝanĝu la malnovajn adresojn de E. K. kaj de ĝia Direktoro.**

# UNIVERSALA INFORMADO (U. I.)

*Anoncoj, komunikoj de U. I. estu sendataj, kun antaŭa pago, rekte al la Direktoro de la revuo.*

Abonintoj de E. K. povas komuniki al ceteraj legantoj ĉion, kion ili volas, pagante por unu vorto kvin centimojn. Vorto da pli ol dek literoj kostos duoble ; — vorto da pli ol dekkvin literoj kostos trioble ; vorto da pli ol dudek literoj ne estos akceptata.

**Loĝado en Franclando :** ➤ JUNULO estus akceptata kiel lernanto aŭ loĝanto en la domo de la Direktoro de E. K. Modera pago.

**Gazetoj :** ➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — Belgujo : 1 frank. — Unuiĝo poŝta : 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro : Xavier CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

➤ LE GLANEUR, Literatura, scienca, muzika kaj bibliografia. — Revuo monata. — Abonkosto : Belgujo : 2 fr. — Ekster Belg. 3 fr. — Administracio, redakcio kaj anoncoj : 466, rue Vanderkindere, Uccles (Bruxelles).

➤ GUIDA CARTOFILA ITALIANA, belega rev., interesega por kolektist. de poŝtk, de « ex-libris » kaj markoj datmemorigaj. Direkt. Grafo D. Cumbo, via S. Maria la Porta, 9. Messina. Abon. kun rajto por unu enpreso de koresp. 3 fr. en Itall. 4 fr. ekstere.

**Korespondado :** ➤ S-INO JANE PARIS, Les Hommeaux, Lion d'Angers, (M.-et-L.), dezir. korespondadi per ilustrit. poŝkartoj aŭ leter. kun ĉiuland. Esperantist.

**Kolektistoj :** ➤ S-o VARJU Endre, Budapest IV, Kygio U. 6. 2. em. 14 kolektas k. interŝanĝas uzitajn poŝtm.

➤ ESPERANTA-KARTOFILATELA KLUBO (E.K.K.), sola klubo kartof. esperant. Jara kotizaĵo : 2 fr. 50. Ĉiu aliĝanto ricevos la revuon : Le Carto-Philatélique Journal, oficiala organo de l'klubo. Direkcio 91, rue de Dunkerque, Paris.

➤ **Fotografaĵoj.** — S-o Jakobo Meazzini (vidu adreson en la nomaro de la Rajtigitoj) skribas al ni « En la venonta somero mi deziras presigi artikolon en la itala monata gazeto *Varietas*, kun la

ĉefaj ilustraĵoj de eminentuloj esperantistaj. Tial mi petas samideanojn, ke ili bonvolu sendi, por tiu dato, kelkajn belajn fotografaĵojn. »

➤ « **La Nova Rassegna** », monata revuo, eniras ĝian trian jaron. Ĝi ĉiam pli dikiĝas kaj aperas ĉiumonate pli interesa ne nur al italoj, sed plie al eksteritaloj. Estas tre gravaj la verkoj pri *Serbo-Kroata literaturo*. Krom tio ĝi publikigas artikolojn lituraturajn, artajn, kritikajn studojn, sciigojn historiajn, paĝojn de fremdaj literaturoj, k. c. kune kun bibliografio de novaj libroj. Kostas nur 6 fr. jare. La gazetoj esperantistaj bone faros eksanĝadi tiun revuon, kiu anoncos ilin. Direkcio kaj Administrac. Via Ricasoli, 61-63, Firenze, (Itall.).

➤ **Tradukataj verkoj presotaj.** — « KRISTNASKA SONORADO » (Christmas Carol) de Charles Dickens, estas tradukata de nia amiko D-ro Martyn Westcott. — *Imitado de Jesuo Kristo*, esperantigita de A. Damevido, presiĝos kiam subskribantoj estos sufiĉe multaj.

**Londono :** ➤ PENSIO por gesinjoroj. Hejmaj konfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni parolas kaj korespondas.

*Sekvo p. V*

# Societo Espero Katolika

CELO Disvastigi Esperanton en la mondo katolika; produkti, traduki, dissemadi katolikajn verkojn; organizi klubojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto, en la katolikaro

KONDIĈOJ : Esti katolika; pagi jaran kotizaĵon minimume da 1 franko. (Ĉiu donacinta 100 fr. estos « Bonfaranto »).

SOCIETANOJ Aprobantoj, Adeptoj, Fervoruloj, Elektistoj.

FAVOROJ SPECIALAJ AL ĈIUJ SOCIETANOJ ili ĝuos rabaton da 0 fr. 50 por aboni la Revuon, rabaton da 0 fr. 20 *por cent.*. por presigi komunikojn en *Universala Informado*, rabaton da 0 fr. 50 por aboni *Oficejon de libraj informoj*.

KLUBOJ : Kiam estas almenaŭ ses anoj de S. E. K. en ia urbo, ili povas kuniĝi, elekti komitaton kaj peti aprobon de la Direktoro de S. E. K. Kluboj tre utilos : 1e por helpi klubanojn en akirado perfekta de la lingvo Esp. ; 2e por krei rilatojn inter diversnaciaj Kluboj aŭ Esperantistoj katolikaj , 3e por kunlabori internacie pri socialaj, religiaj, literaturaj, artaj, komercaj aferoj, k. c. Por faciligi tiajn rilatojn tre gravas, ke ĉiu Societano konigu sian specialaĵon aŭ profesion. Ni do proponas krei jenajn Fakojn en S. E. K. I, Religio II, Socialaj studoj. III, Literaturo. IV, Artoj. V, Komerco kaj Industrio. Aliaj Fakoj formiĝos laŭbezone. Ni do petegas tiujn, kiuj sendos aliĝon al S. E. K., klarigi samtempe en kia Fako ili deziras enskribiĝi. *Ni senpage publikigos unufoje plenan adreson kaj specialaĵon de la Societanoj.*

TRE GRAVAS POR NIA ENTREPRENO KE ĈIUJ KATOLIKAJ ABONANTOJ DE E. K. ENSKRIBU SIN EN S. E. K.

# ESPERO KATOLIKA

## REVUO MONATA EN ESPERANTO

«Unum ovile et unus pastor». — (*Johan X. 16*).
«Unu ŝafaro kaj unu paŝtanto»

**Direktoro P-o Em. PELTIER — (PELTJE)**
**à Sainte-Radegonde près Tours (Indre-et-Loire) France**

**Abono jara :** En Franclando : 2 frankoj. Ekster — 2 fr. 50. | **Unu numero :** 0 fr. 30, afrankite.

**Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj : oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en augusto nek en septembro.**

**Anoncoj.** — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4na paĝo : 4 fr. ; 8na paĝo 2 fr. 50 ; 16na paĝo : 2 fr.

Por anoncoj ripetitaj, rabatoj por tri fojoj 10 %; — ses fojoj : 15 % ; — por 12 fojoj 20 %

**Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K.** estu sendataj nur al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Anglolando : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.
Belglando : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
Ĉililando S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.
Hungarlando S-o Endre Varjufalvy Varju, IV, Kigyo, U. 6, 2. em. 14 BUDAPESTO. —
Itallando : S-o J. Meazzini, presso Franco Lucani, piazza G. Monaco 18, AREZZO.
Hispanlando : S-o Ant Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.
Ruslando Societo Espero Bol. Podjaĉeskaja, 24, log. 12.
Meksiklando S-o Fernando Blanco, Pastro de Santa Rosa, NECOXTLA. (Estado de Veracruz).
Brazillando S-o José Felippe d'A. Coutinho, en Paty. E. F. C. B. (Rio de Janeiro).
Bulgarlando : S-o G. Oreŝkov, en Plovdiv.
*Niaj Rajtigitoj povas varbi abonantojn kaj ricevi l'abonmonon.*

PRESEJO A. BARBOT
15, Rue Etienne-Pallu, 15
TOURS. (TUR') FRANCE

# EL LA MONDO KATOLIKA

**Eklezio kaj Ŝtato en Francujo.** La disigo de Eklezio kaj Ŝtato estas efektivigita en Francujo. Jen ekstraktoj de la parolado de S-o Méline, Eks-Prezidanto de l'Ministra Konsilantaro, antaŭ la voĉdono de la leĝo : « Oni ne devis fari tiun leĝon, kelkajn tagojn post la leĝo pri la Kongregacioj, kiu tiel profunde malkvietigis la nacion... Vi trudas al la pastraro arbitrajn regulojn. Mi pensas, ke Eklezio egalvaloras grandan institucion publikan. Kial vi ne sammaniere agas kun ĝi ?... Vi povis fari tian transformon iom post iom. Vi tion ne volis. Post unu jaro, la vivmaniero de kvar jarcentoj devos esti ŝanĝita. Mi konsentas, ke la pensioj (al la pastroj maljunaj) estas sufiĉaj. Sed vi plene oferas la junan pastraron. Vi faros el ili legion da ribelantoj, nekvietigeblaj kontraŭuloj de via leĝaro.

«... Via leĝo estas ataka plano kontraŭ l'ideo religia. Via celo estas disigi de Eklezio ian nombron da personoj. Aliaj el vi volas puni la pastraron pro pretendita kontraŭago al la Respubliko... Kredi, ke via leĝo mortigos l'ideon religian, estas stranga iluzio. *Mi rimarkas, ke la popoloj la plej antaŭen en la civilizacio estas la plej religiaj.* Vi esperas gajni la nekredantojn, kiuj ankoraŭ praktikas la religion maltrompiĝu ; skuitaj de la grandaj suferoj de l'vivo, ili revenos al Eklezio.

«... Ĝis nun la pastroj restis izolitaj en sia pastrejo ; nun ili batalados, kaj kreos al si klientaron... Vi iluzias, se vi kredas proksima la venkon de racio... Vi ekscitos kontraŭ vi timegindajn kolerojn Antaŭe vi plendis pri la pastraro ; nun vi havos ankaŭ fideluloјn kontraŭ vi... Vi invitas la pastraron al batalado, ĝi organiziĝos, kaj ni vidos.. La Papo nomos episkopojn laŭ sia deziro, eĉ anojn de Kongregacioj. Vi indignis tial ke du episkopoj sin turnis al Romo : morgaŭ ĉiuj iros Romon. Vi havis muron por vin protekti vi anstataŭis ĝin per araneaĵo !... Estis nur unu rimedo por solvi la problemon : fari novan Konkordaton. Poste vi estus povinta efektivigi la disiĝon. Kion vi ne faris, tion faros alia registaro ajn, post kelkaj jaroj. Lando en kiu vivadas pli ol 30 milionoj da katolikoj ne povas resti disigita de l'Estro de l'katolikaro ». — Tiu juĝo de S-o Méline esta la plej severa kaj ĝusta kondamno de la leĝo disiga.

En la *Revue des Deux-Mondes*, S-o Brunetières, Akademiano, energie kondamnas la leĝon, kiun li nomas « ŝtela leĝo ». Tamen li pensas, ke la katolikoj devas provi vivi sub tiu leĝo. Jen la grava konkludo de lia artikolo « La vera demando estas ĉu Francujo volas « mal-franciĝi » kaj la mondo « mal-baptiĝi ». Tiun demandon nia episkoparo kunigita devos ankaŭ respondi, kaj kiam ĝi estos decidinta kia estos la agado de Eklezio kontraŭ la leĝo disiga, ni petas, ke la episkoparo diru al ni, kaj difinu larĝe kaj precize, la rimedojn, kiujn Eklezio posedas por kontraŭstari la atakojn de la liberpensado.

Ĝemadoj ne povas sufiĉi, nek kulpigoj kontraŭ framasonaro, nek agado elektada, nek ĝenerale literaturo aŭ politiko. Oni devas serĉi kaj trovi alion! Se eble oni jam trovis, aŭ se oni provis, de kelkaj jaroj, tion trovi, tie kaj tie ĉi, en Eklezio kaj ekster Eklezio, en Francujo kaj ekster Francujo, estas nun ĝustatempe diri kia estas la valoro de tiuj provoj; koncentrigi tiujn penadojn disestantajn; doni al ili direkton alcentran kaj komunan; ilin « seriigi », kiel oni diras, kaj trudi al ili, kune kun unueco, tiun adon en ago, sen kiu estas ĉiam timinda ke la penadoj perdiĝu kaj ne atingu la celon, eĉ kaj precipe ĝin preteriru. Se kelkaj instruaĵoj, kiujn Eklezio cetere ne povas forlasi, estas nun « nedefendeblaj » per la argumentoj, armiloj kaj rimedoj antaŭaj, oni devas uzadi rimedojn novajn, armilojn pli modernajn, kaj ĝenerale argumentojn ne malpli « nuntempajn » ol la atakoj. » — Pripensinda demando!

**Katolikaj lernejoj en Anglujo :** La anglaj katolikoj tre timas, ke, en baldaŭa estonto, la katolikaj lernejoj estu forigitaj. Papo Pio X-a skribis al la ĉefepiskopo de Westminster London), por laŭdi la fervoron de la katolikaj kardinaloj anglaj, kiuj kuraĝe bataladis, dum la 30 lastaj jaroj, por konservi siajn lernejojn. Pio X-a gratulas ĉefepiskopon Bourn, tial ke li daŭrigas la bataladon. La Sankta Patro opinias, ke « katolikoj estos helpataj de homoj, kiuj ne havante saman kredon, tamen konsentas kun ili pri la neceso doni al la gejunuloj katolikaj edukadon katolikan. »

Espereble la katolikaj ĵurnalistoj nun sekvos kaj helpados la ĉefepiskopon de Westminster en lia agado.

**Katolikismo en Australio** Multe progresadas la katolikaro en Aŭstralio. En 1838 estis nur unu pastro sur tiu grandega kontinento; la fideluloj estis tre malmultaj. Hodiaŭ oni kalkulas en Aŭstralio pli ol unu milionon da katolikoj (1.011.550). Estas 5 pastraj provincoj, 6 ĉefepiskopoj (inter kiuj unu kardinalo) kaj 21 episkopoj. La pastraro kalkulas 1300 pastrojn. Pli ol 600 fratoj instruadas en lernejoj. Estas ĉirkaŭ 5500 religiulinoj. La knaboj estas instruitaj en 33 kolegioj kaj la knabinoj en 169. Ekzistas plie 235 superaj kaj 1087 unugradaj lernejoj, kaj 94 bonfaraj hejmoj. La episkopoj ĵus solenigis trian ĝeneralan Konsiliĝon. Aŭstralio baldaŭ fariĝos unu el la plej prosperaj provincoj de l'Eklezio katolika.

---

## ESPERO FRAMASONA

Tiu asocio fondiĝis dum la Kongreso Esperantista, en Boulogne. Jen ĝiaj deklaracioj, publikigitaj unue en « Germana Esperantisto » ;

E. F. ne celas krei novan riton, sed 1-e kunigi la diverslandajn framasonojn esperantistajn; 2-e altiri esperantistojn al la framasonaro kaj reciproke framasonojn al Esperanto; 3-e forigi malkonsentojn kaj antaŭjuĝojn inter la diversnaciaj framasonoj dank'al la scio de Esperanto.

## POSTMARKOJ KIEL ABONPAGO.

En la novembra n-o de *L'Esperantiste* S-o, Ĉefeĉ, la sindonema aŭtoro de la mirindaj « Ŝlosiloj » propagandaj, konigas, ke li akceptas la poŝtmarkojn de ĉiuj landoj pro ilia efektiva valoro. Tial li konsilas la Esperantistajn gazetojn, ke ili akceptu de nun abonpagon per poŝtmarkoj. Ni tre dankas S-on Ĉefeĉ kaj *de nun ni akceptas poŝtmarkojn kiel abonpago por E. K.* — Ni poste interŝanĝos la nefrancajn kun S-o Ĉefeĉ.

Tiuokaze,ni sciigas,ke S-o Cefeĉ eldonis,krom liaj « Ŝlosiloj »,beletajn propagandajn poŝtkartojn angle, france, germane kaj itale redaktitaj [1].

# PRI ESPERANTAJ PRONOMOJ KAJ ADJEKTIVOJ

Ĉiuj esperantistoj interkonsentas pri la senco de la vortoj « kiu; tiu » — « kia; tia ».

Ili uzas la formon kun *u*, por montri la INDIVIDUECON, kaj la formon kun *a*, kiam ili volas insisti pri la SPECECO.

Plie, la formon kun *u* ili uzas ADJEKTIVE KAJ PRONOME. Ili ja diras

ADJEKTIVE : « tiu komo estas bona »

PRONOME « tiu, kiun mi vidas »

Pri « ĉiu ; ĉia » la konsento estas malpli ĝenerala. Kvankam preskaŭ ĉiuj esperantistoj uzas PRONOME KAJ ADJEKTIVE la formon kun *u*, kelkaj tamen uzas « ĉiu » nur PRONOME, kaj « ĉia » nur ADJEKTIVE; aŭ eĉ « ĉia » PRONOME KAJ ADJEKTIVE.

En E. K., ekzemple, oni povas legi

PRONOME : « 200 Esperantistoj — ĉia kun verda stelo ».

ADJEKTIVE « 60 centimoj po ĈIA rifuzinto. »

Ŝajnas al mi, ke tiu uzo de « ĉia » ne estas tute ĝusta.

Efektive D-ro Zamenhof skribis en la antaŭparolo de FUNDAMENTO DE ESPERANTO

ADJEKTIVE : « ĉiu Esperantisto ».

PRONOME : « al *ĉiu*, kiu montros al mi... »

Li do uzas ankaŭ « ĉiu » PRONOME KAJ ADJEKTIVE.

Nur pri « iu ; neniu » — « ia; nenia » la ĝenerala uzo estas, ke la formo kun *u* estas pronomo, kaj la formo kun *a* estas adjektivo. Oni ja kutime diras :

ADJECTIVE « IA verko ; NENIA homo. »

PRONOME : « iu venis ; neniu provis legi ».

Tiu escepto povas ŝajni bedaŭrinda en lingvo tiel regula kiel Esperanto. Sed, legante la antaŭparolon de la jam citita FUNDAMENTO, ni ekvidas, ke ankaŭ « iu; neniu » estas uzataj PRONOME KAJ ADJEKTIVE de Zamenhof mem. Li ja skribis

1. 1 fr. 35 la centon, 11 fr. la milon; ĉe S-o. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Road, Streatham, London, S. W ; aŭ ĉe la Direktoro de E. K.

ADJEKTIVE : « NENIU persono kaj NENIU societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento IUN eĉ plej malgrandan ŝanĝon ! » (paĝo Va ).

PRONOME : « Neniu havas la rajton... »

Ĉu ni ne povus konkludi el tio la jenan ĝeneralan regulon

LA FORMOJ KUN U RILATAS LA INDIVIDUECON, KAJ ESTAS UZATAJ PRONOME KAJ ADJEKTIVE.

LA FORMOJ KUN A RILATAS LA SPECECON, KAJ ESTAS UZATAJ NUR ADJEKTIVE ?

Simpla demando, kiun eble respondos iu pli kompetenta ol mi.

TEDULO.

---

# REVUO DE L'ESPERANTISTAJ REVUOJ

LINGVO INTERNACIA (1 nov.) *La ĝardena urbo* (de nia amiko P. D. Hugon) priskribas provon faritan por fondi novspecan urbon laŭ la principoj de « simpla vivado ». Tiu « Ĝardena Urbo » estas nun kronstruata en Letchwort, Hertfordshire, Anglujo. Societo anonima aĉetis grandan bienon, difinis en ĝi stratojn, rizervis lokon en la centro de la bieno por publikaj konstruaĵoj urbdomo, poŝtoficejo, urbaj oficoj, preĝejoj, k. c. aukaŭ por publikaj parkoj. La Societo vendas partojn de l'bieno kondiĉe, ke oni konstruos domon. Kelkaj loĝejoj estas jam konstruitaj, laŭ tute modernaj principoj de higieno.La unuaj loĝantoj, oni konfesas, estas precipe « originaluloj », sobrigistoj, vegetarianoj, vest-reformistoj, socialistoj, anoj de simpla vivado, k. c. Sed, diras, S-o Hugon « en niaj liberemaj tempoj, tiu diverseco estas fonto da forto. Kiaj ajn estas iliaj opinioj, tiuj homoj estas ĉiuj *bonvolaj...* ». La tuta artikolo estas leginda. — (15 nov.). *La vojaĝoj de Uliso*, literatura artikolo de la klera profesoro Ch. Lambert. — *Natanja Patro*, pentraĵo el la nuntempa vivado (de Sĉepkina-Kupernik) esperantigita de N. Kabanov. — Artikolo nekrologia de S-o Fruictier pri Paul Tenneson, nia Bonfaranto « Lia agado estis senbrua, sed konstanta kaj ĉiam pozitiva... Li servadis al la homaro ne per vantaj paroloj, sed, — kio estas pli bona, — per silentaj faroj. »

SCIENCA REVUO (nov.). — El « *La Orientado de la vojaĝanta kolombo* » (Psikologio zoologia), de E. A. Thauziès : « Oni povas demandi min laŭ kiuj faktoj mi hipotezas pri ia inteligento kaj rezonado ĉe la vojaĝanta-kolombo. Mi povus rajte diri : « Laŭ kiuj faktoj vi eldiras malan hipotezon ? » Ĉar estus utile difini unufoje kion oni nomas la bestecon de l'bestoj. Laŭ multaj, la inteligento kaj la rezonado estas homa privilegio. Plej strange, la anoj de tiu tezo, sufiĉe vanta, se ne vana, estas ĝenerale konvinkitaj ke la homo estas pliperfektiĝinta besto. Besto perfektiĝinta, eble. Sed se tiu besto ĉiam posedis ĝin, kial la aliaj bestoj estu senigitaj je ĝi? Se ĝi akiris ĝin, kial la aliaj bestoj ne povas akiri ĝin siavice? Kaj precipe kial ili ne povus akiri ĝin dank'al la ĉiama kunesto de l'homo, kiu dresas, formas,

intruas ilin kaj profitigas la praktikaĵojn kaj lertaĵojn inspiritajn de liaj ĉiam kreskantaj progresoj kaj bezonoj?... Vere, ĉiam alvoki al supereco de l'homo je la besto estas tre oportune... Laŭ mia modesta opinio, la vojaĝantaj-kolomboj, kiujn mi studas pacience jam de longa tempo, nedubeble posedas specialan inteligenton, kiu ebligas observi, komparadi, rezonadi, pripensi. Mi povus doni multajn pruvojn pri tio; sed kelkaj sufiĉe klare montriĝas el tio, kion mi skribis pri tiu temo; pri la ceteraj, mi nur citos du aŭ tri ĉefajn faktojn. » — Mi konfesas, ke la faktoj poste cititaj ne pruvas, ke la v.-k. posedas inteligenton tian, kian S-o Thauziès priskribas supre. Tiu inteligento ja ne diferencus de la *homa* inteligento tion oni devas nepre *pruvi*, antaŭ ol ĝin akceptigi!...

ESPERO PACIFISTA (okt.-nov.).— Du numeroj en unu; 184 paĝoj. Ĉiam plej interesa. En la Kongreso Pacifista de Lucern', S-o Moch provis akceptigi Esperanton kiel lingvo uzebla por la venonta kongresoj. Li ne sukcesis; sed ĉio ne estas perdita li petas ke *ĉiuj esperantistoj* sendu al li (26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine, Francujo) poŝtan karton laŭ la jena modelo: « Mi subskribinta (nomo, profesio, adreso, nacio), petas ke la lingvo Esperanto povu esti uzata en la Kongresoj Universalaj de Paco, por ke tiuj ĉi ne estu plu fermataj al la multegaj homoj, kiuj ne scias paroli la lingvojn nuntempe permesitajn. » — S-o Moch portos tiujn poŝt-kartojn al la oficejo komitata, kies membroj kunvenos en majo. Ni reparolos en venonta nnmero, pri la grava enhavo de E. P.

TRA LA MONDO (nov.). — Kuriozaj artikoloj pri « kristnaskaj kutimoj » de Anglujo kaj de Svedujo. — El la « Vintromeza sunfesto » en Svedujo « Kiam la krista eklezio etendiĝis en la Roma regno, oni komprenis, ke la vintra sunfesto estas tre enradikita en la popolajn sentojn, kaj apenaŭ estas ekstermebla. Do oni uzis por la idolista sunfesto saman rimedon, kiel oni uzis en multaj aliaj cirkonstancoj : la malnovaj festoj estis konservataj kun kristaj signifoj... — Per siaj ordonoj pri la « kristnaska paco » la svedaj mezepokaj leĝoj montras, ke la vintromeza festo estis plej eminenta el ĉiuj festoj de la jaro. Kvankam Pasko laŭ krista konfeso devus esti pli grava ol Kristnasko, unu el tiuj leĝoj tamen ordonis, ke kristnaska paco daŭru tri semajojn, sed paska paco nur duonan semajnon. Tiu, kiu rompis iun el tiuj pacoj, devis pagi monan punon ambaŭ al la episkopo kaj al la kantono. (*Originale verkita de* J. LUNDGREU, *el Svedujo*).

## NOTETOJ

HOLANDA ESPERANTISTA SOCIETO estas fondata sub la nomo *Estonto estas nia*. Estraro S-oj Dreves Uitterdijk, en Hilversum; D. F. Romein, en Utreĥto, kaj P. S. Gerlings, en Livolle, kiel korespondanto donanta informojn al nesocietanoj *Holanda Pioniro* kredeble fariĝos organo de la Societo.

EN BRUNN (MORAVIO). Kelkaj kuraĝaj Esperantistoj klopodas por divastigi Esperanton per paroladoj, kursoj, k. c. Ili treege petas, ke oni sendu al ili dokumentojn por fari ekspozicion kaj pruvi per faktoj, ke Esperanto estas jam disvastigita tra la tuta mondo. Atentu tiun alvokon kaj sendu hodiaŭ (ne morgaŭ !) esperantaĵojn al S-o Karlo Steier, en Brünn (Moravio), Rathausgasse, 1, Môhren.

CU VI VOLAS VINON... ESPERANTISTAN ! — Petu de S-o L. Courtade, 45-47, r. Lagrange, Bordeaux « Francujo » lian *Prezaron* en Esperanto pri vinoj kaj brandoj.

JOVENTUT, revuo Katalana, eldonita en Barcelona' (Hispanujo), enhavas nun « Esperantan Fakon ». — Vekiĝas Katalanoj.

THE QUEEN, grandega revuo por virinoj, publikigas lecionojn pri Esperanto, de nia amiko P. D. Hugon. La sama aŭtoro ankaŭ presigas serion da artikoloj en kurioza gazeto « *The Crank* ». Ni tre gratulas S-on Hugon, ke, post iom da ripozo, li denove bataladas por Esperanto.

MUZIKO. *Flugintaj revoj*. Esperanta poezio de nia bonega poeto Grabowski. Muziko de Paŭlo Wachs. Pri la poezio ni povas nur diri, ke ĝi estas ĉarma. (Oni povas ĝin legi en la *Krestomatio* de D-ro Zamenhof). La muziko estas tre gaja, facile kantebla, skribita por duon-soprano aŭ baritono. Sur la kovrila paĝo, desegnaĵo montras junulon sidantan kaj kviete fumantan. Forflugas liaj revoj kun la fumaj ringoj...

Unu rimarko S-o Wachs iafoje disigas vortojn en du partojn. Ekzemple, estas du notoj sur la unua zilabo de « faj-ro » kaj antaŭ ol elkanti la duan silabon oni havas *silentan punkton*? S-o Wachs povis facile tion eviti per plilongigo de l'antaŭa noto. Lerta kantisto korektos mem tiun difekteton, kiu kredeble malaperos en dua eldono kaj kiu ne malhelpas, ke « *Flugintaj revoj* » estas ŝatinda kaj kantinda verketo (1).

ESPERANSISTA CENTRA OFICEJO. El la 2-a Cirkulero Koncerne la Lingvan Komitaton, D-ro Zamenhof mem esploros, konsente kun Rektoro Boirac, la regulojn arangôtajn por ĝia funkciado, kaj sciigos, kiel eble plej frue, la alprenitan de ili solvon. — Koncerne la Provizoran Organizan Komitaton, D-ro Zamenhof deziras, ke la ordinaraj laboroj, rezervante la principajn kaj gravajn decidojn, estu preparitaj nur per la oficiala prezidantaro elektita de la kongreso de *Boulogne-sur-Mer* por formi la diritan komitaton, tiel estas D-ro Zamenhof, prezidanto ; S-oj Boirac, Michaux, Mybs, Pollen, kaj Sebert, vicprezidantoj, kaj provizore, per la iniciato de tiu lasta vicprezidanto, kiu akceptis kelkatempe tiun taskon. — S-ro Gabriel Chavet estas akceptita kiel Sekretario-Agento de la « Esperantista Centra Oficejo ».

(1) Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K. po 2 fr. (6 paĝoj da muziko).

Presejo A. BARBOT, Tours. *Le Directeur-Gérant* EM. PELTIER

KUN SES BELAJ ILUSTRAJOJ,
KATO KUN BOTOJ.

Kosto 0 fr. 50, afrankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K.
Specialaj kondiĉoj por almenaŭ *dek* ekzempleroj kune mendataj.
**Baldaŭ aperos n-o 2 a : Cindrulino, kun 6 ilustrajoj ; sama prezo.**

LINGVO INTERNACIA
ESTAS NUN DUONMONATA

Enhavas 24 paĝojn. Sen literatura aldono 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède. Paris, 5e.

➣ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro- Fondatoro XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, kygio U- E. 62. em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

LONDONO ; PENSIO por gesinjoroj. Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino O'Connor, Esperanto House ; 17, St-Stephen's Square ; London-Bayswater.

HO, MIA KOR Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Musiko de S-ino Josée GUIVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo 1 fr.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.
S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro : Pastro Laberthonnières. Administracio : Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris, abono jara : 20 fr. — 100-paĝo monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia !

Esperante, Angle kaj France. Sinjorino O'CONNOR. Esperanto House. St. Stephen's Sq^r, Bayswater, 17.

➤⊸ ESPERANTA LIGILO, revuo por Blind., eliros en 1905 ĉiudumonate (6 numer. jare). Abono : 3 fr. Oficejo 12, rue Soufflot, Paris. Direktoro : S-o Th. Cart. Oni abonas ankaŭ ĉe nia « Oficejo de Libraj Informoj ». — La 4 n-oj de jaro 1904 estas nune aĉeteblaj.

**Vojaĝoj** : ➤⊸ S-o CASIER, 83, boulevard Anspach, 83, Bruxelles (Bourse). — Téléphone 45-50. — Biletoj rektaj aŭ rondiraj kun rabato. — Ekskursoj sen aŭ kun konduktoro kosto laŭ reciproka konsento. -- Speciala kaj agrabla sistemo por edziĝaj aŭ familiaj vojaĝoj.

# LIBROJ KAJ GAZETOJ RICEVITAJ

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (Revuo de Franca Pastraro). 1-a de Marto. Precipaj artikoloj Koncerne la disigo de l'Eklezio kaj de l'Ŝtato (J. Bricout). -- Por la Psikologio religia G. Michelet). — Poeta Pastro (A. Ducrocq). Kroniko de Eklezia Historio (J. Turmel). — Konsiliĝoj kaj informoj. — Libera Tribuno kaj dokumentoj.

15-a de Marto : La kunvenoj de'l pastraro dum la « malnova regado » (antaŭ la Revolucio) (I. Bourlon). Kroniko Filozofia : la fontoj de la kredo en Dio (E. Lenoble). — Tribuno libera kaj dokumentoj Kelkaj pripensoj pri la Grandaj-Seminarioj (Ch. Bujon — La lingvo internacia Esperanto (Em. Peltier).

PROTECTION DE LA JEUNE FILLE (Protektado de la Junulinoj) Febr. Nekrologio : Prelato J.-J. Eberlo. — Kroniko : German-, Anglo-, Ital-, Portugal-, Svislando — Aldono por Francl. Protektado de la Junulinoj en Angers, Saumur, Cholet, Marseille. — Novaĵoj el la diversaj grupoj.

LA VOIX DE SAINT-NICOLAS (Voĉo de S-ta Nikolao) Marto. Paroĥa Bolteno de P-o Joncquel, de Boulogne. Tre interesa.

ANNALES DE N.-D. DU LAUS (Analoj de N. S-ino de Laus) Febr. Kroniko de l'pilgrimo. — Letero de l'Episkopo de Gap. k. c.

UNE LANGUE INTERNATIONALE « ESPERANTO » de D-ro Saquet, Prezid. de l'grupo Esp. de Nantes, Vic-Prez. de la Société Académique de Loire-Inférieure (eltiraĵo de l'Bolteno de la Societo). Tre bona broŝuro 14-paĝa de nia agema kaj klera kunbatalanto.

SCHLUSSEL ZUM VOLLSTANDINGEN LEHRBUCH DER ESPERANTO-SPRACHE, Von J. BOREL. (Ŝlosilo por la plena lernolibro de Esperanto). Nova kaj malkara (50 Pfennig) eldonaĵo de la senlaca firmo Borel, el Berlino. Apostolaj eldonistoj estas tute bezonataj por la katolikaj eldonaĵoj... Kiu trovos kelkajn ?...

VORTARO DE ESPERANTAJ RIMOJ, de J. RHODES, F J I. (Diplomito). Broŝuro 24-paĝa gravega, tial ke ĝi *enhavas la plenan radikaron nun uzatan de* la plej spertaj Esperantistoj. Prezo 60 centimoj, afrankite. La versamantoj, versfaristoj devas tuj mendi tiun verketon.

RAKONTOJ PRI FEINOJ, de Ch. Perrault, esperantigitaj de S-ino Sarpy, Paris, Hachette, Prezo 1 fr. Libro 84-paĝa, el la Kolekto Aprobita.

# BLANKA DRINKAĴO KONTRAUMIKROBA

de Pastro A. MAGNAT, paroĥestro de Ancône.
Preparata de J. BRÉMOND, Farmacisto 1-aklasa en Marseille
Sániĝas kun surpriziga rapideco, post kelkaj horoj

**Influenzon**, gripon, kokluŝon.
**Variolon**, morbilon, skarlatinon.
**Tifan febron**, erisipelon.

**Plene sukcesas kontraŭ**

haŭtajn malsanojn : ekzemon, likenojn, k. c. Sin turni al S-o François Villemeyre, Esperantisto, rue des Mirepoises, FIGEAC (Lot) Francl.


# OFICEJO DE LIBRAJ INFORMOJ

(O. L. I.)

CELO : 1e liveri informojn pri francaj kaj Esperantaj libroj aŭ gazetoj; 2e ricevi kaj plenumi mendojn pri libroj aŭ gazetoj.

UTILO Ĉiulandaj Esperantistoj povos per O. L. I. aĉeti librojn francajn aŭ esperantajn, aboni la gazetojn, kaj. antaŭ ol aĉeti libron, peti informojn pri ĝia kosto, enhavo, valoro. — Kiam ni havos Korespondantojn en ceteraj landoj, O. L. I. liveros informojn pri verkoj el kia ajn lando. Ni baldaŭ konigos landojn en kiuj ni havos Korespondantojn. *Ĉiu Esperantisto eĉ ne aboninto de E K. povas uzi O. L. I.*

ABONO : Ĉar O. L. I. necesigos specialan Sekretarion kaj multe da klopodoj por kolekti utilajn informojn, ni estas devigataj postuli sumon da *5 frankoj* por abono jara. El tiu sumo 3 fr. pagos l'abonon, kaj 2 fr. pagos la elspezojn de korespondado. — Abonoj etsas akceptataj en kia ajn epoko, sed nur por unu jaro.

Neabonantoj povas uzi O. L. I. pagante 0 fr. 50 por ĉia mendo aŭ peto de informoj.

ĈIU ABONO AŬ MENDO ESTAS ANTAŬE PAGOTA. — POŜTMARKOJ (ESCEPTE FRANCAJ) NE ESTAS AKCEPTATAJ KIEL PAGO.

FUNKCIADO : Oni respondos plej rapide, kiel eble, al ĉiu mendo aŭ peto de informoj. Kiel eble la respondo fariĝos per poŝtkarto, — escepte se l'aboninto postulos leteron. Kiam estos konsumitaj la 2 frankoj provizitaj por la elspezoj de respondado, avizo estos sendata al l'aboninto kun la lasta respondo. Li tiam devos denove sendi 2 fr., se li deziros adi mendojn. — Se fine de l'jarabono restos ia sumeto, ĝi estos enkalkulata kaj forprenata de sekvanta abonpago. Se oni ne reabonos, la sumeto ne estos resendata, sed oni povos ĝin uzi por apartaj mendoj po 0 fr. 50, *dum unu monato post le fino de l'abono.*